La mankanta numero elĉerpiĝis

2.ª JARO N.° 7 DUONMONATA ESPERANTO - GAZETO 1 FEBRUARO 1937

3

# PoPola Fronto

INFORMA BULTENO INTERNACIA PRI HISPANA LUKTO KONTRAŬ LA FAŜISMO

ELDONO DE GRUPO LABORISTA ESPERANTISTA
REDAKCIO K ADMINISTRACIO: STRATO MAR, NUM. 25 VALENCIA (Hispanio)

## TRA OBJEKTIVA LORNO

Kvazaŭ pro magneta akso, ĉirkaŭ la tragedia aktualeco de la hispana situacio, densiĝis tro konfuza nebulo de falsa informado aŭ erara kompreno antaŭ la vera interna stato de la lando, en lojala teritorio, dum vigla tajdo de specialaj zorgoj flusas k malflusas.

La reakcia trusto universala de bankieroj k magnatoj, per la klarionoj de sia fripona gazetaro k per la buŝo dungita de siaj politikistoj, svingis alarme k cinike la timigilon pri ruĝa revolucio eksplodanta abrupte en Hispanio por renversi la ordon, kulturon k civilizon de Eŭropo. Se ne la klaskonscia proletaro, kiu certe ne timas perdi tion, kion ĝi ne posedas; almenaŭ granda parto el la ĝenerala meza opinio internacia, pli aŭ malpli liberala, pli aŭ malpli demokratema, sed ne ĉiam inklina al ŝanĝoj k riskoj subitaj, falis naive en la reton k ĝi, sen atento al medito nek al ĝusta takso pri la kaŭzoj k efikoj de tiu grava okazintaĵo, serĉis rifuĝon, por sia relativa ekonomia trankvileco, en la glavo militista kontraŭ la popola pugno, kiu leviĝis, kiel natura martelo, por defendi precize la regulajn k normalajn fundamentojn de la ŝtata ekvilibro. Por detrui la trivialan kurtenon el mensogoj, urĝas do gajni, per vero, la fidon de tiu ampleksa hezitema klaso.

Ribelo de marŝaloj tute ne estas klasbatala revolucio. En nia lando tiuj mem, kiuj patose parolas pri la ordo, pri obeo, kiam temas pri striko aŭ strata manifestacio, rompis la leĝojn, renversis la ordon, detruis la disciplinon, malobeis la legitimajn ordonojn en tumulto k ĥaoso...

En Hispanio krevis komploto de aristokratoj, ne eksplodis revolucio de proletoj! nia malfeliĉa, sed digna, popolo ne ĵetis alumeton en la pulvon. Matematika logiko de ciferoj, dum malfacila balotado, donis supermezure al popolo la garantion de leĝa rajto interveni k influadi, kvankam modeste, pacience, je marŝo de testudo! sed ĉiam obstine antaŭen, en la politika gvidado de ĝia lando, kiel jam natura k eĉ jura sekvo, post intensa interveno en la nacia ekonomio, kun ŝvito k peno, per alta laboro en nigra fundo de mino, apud tablo de oficejo, ĉe rimenoj de maŝino aŭ per dorso kurbiĝinta sur la bruna tero de fekunda kampo, por dika profito de nur kelkaj poŝoj.

Eble, paca gajno de rajto estas revolucio por la privata indekso de kapitalistoj, kiuj ekribelinte kontraŭ la oficiala ordo de la Respubliko, ordo malagrabla por ili, sed tamen ja ordo! vundis la stilon de siaj tradiciaj normoj. Ili mem subfosis la bazon de siaj propraj argumentoj per abrupta atako al popolo, mikso socia el proletaro, kamparanaro k etburĝaro, kiu, antaŭ la kruda cirkonstanco devi defendi per armiloj sian politikan k fizikan ekziston, povis kapti hazarde la okazon ŝanĝi tuje almenaŭ la strukturon de kelkaj ŝtataj instancoj, ĵusaj nestoj de konspiro, k ankaŭ eniri kontrole en multaj fabrikoj, magazenoj, k negocoj forlasitaj, pro fuĝo de ĝiaj faŝistaj mastroj, en lokoj kie la ribelo fiaskis.

Pro interveno de l' faŝismo internacia, la ribelo estas nun grava milito, seriozaj postuloj staras. La ariergardo devas streĉi fortojn metode; la ŝtato do, kun helpo teknika de sindikatoj, mastrumas la ekonomiajn faktorojn, por militaj celoj, en la lojala teritorio. Tiu industria aspekto, natura dum milito, kun la gaja flirto de partiaj flagoj, natura ornamo de popola entuziasmo k ĝentila akompano de la nacia trikolora standardo, povas liveri, al facila observanto, la supozon, pro ŝajno k formo, ke revolucio jam, anstataŭ milito, flagras nun en Hispanio; kruela milito nur, decida risko ankoraŭ, kies gajno, antaŭ danĝero de perdo, devas esti unika zorgo por saĝaj homoj, kiuj evitos unue fali en abismon por efektivigi, sen baro en la vojo, revojn k aspirojn.

Ne revolucia komitato sed legitima ministraro regas en Hispanio, gvidante la lukton kontraŭ la faŝismo.

Sufiĉe jam! ne plu skandalo pri skarlata fantomo! En Hispanio, kun situo en Eŭropo, ankoraŭ ĉiutage vulgare la suno aperas salute ĉe oriento k melankolie en okcidento subiras... dum mortas popolo en defendo de vivo feliĉa.

## ORIENTO!

Blovo, el ekstrema oriento, ventolas petole hodiaŭ tra ĉi tiu diskreta bultena kolono, intima anguleto aranĝita por flue babili kun la esperantistoj pri aferoj malpezaj, en momenta forgeso kelkfoje, por ripozo de cerbo k distro de penso, pri la ĉefa temo k la grava tasko havigi argumentojn, sinsekve k daŭre, kontraŭ la faŝismo, fia malamiko de ĉia progreso.

Antaŭ kelkaj tagoj, ni ricevis el Ŝanhajo mem, ĝentilan donacon de granda ruĝa standardo, el pura ĉina silko, kun tre arda velura dediĉo.

Sama sufero povas esti ligilo, kiel spirita girlando, inter homoj de malproksimaj landoj, diversaj rasoj k fremdaj lingvoj. Se, eĉ per gesto silenta k muta rigardo, kapablas la menso vivigi komprenon, por esprimi proteston k sanktan malamon, kontraŭ despotaj ordonantoj de turmentoj k torturoj rafinitaj; kion do ne inspiros la sama balbuto, en ĉarma resono, je karesa vorto de nia Esperanto?

La ĉinaj kamaradoj scias, per senkompata sperto, la domaĝojn de intervena milito; ili kiel ni, hispanoj, luktas brave kontraŭ perfidaj generaloj k feŭdaj mandarenoj akceptantaj, sen skuo de konscienco, la dungon de fremduloj por detrui urbojn k buĉadi homojn de sia propra lando. Ili ankaŭ, esperantistoj kiel ni, eldonas kuraĝan bultenon, sub nomo drameca de «Ĉinio hurlas», frato ĝemela de POPOLA FRONTO, por vasta internacia informado pri libero ĉifita, pri rajto profanita. pri rikano de ridaĉo antaŭ spasmo de doloro...

Dum avara ripozo ili memoras k pensas pri siaj hispanaj malproksimaj fratoj. Tra volvaĵoj de ŝtofo delikata ni perceptas la parfumon de subtila tre eleganta solidaro, kiu per tuko de simbola trofeo instigas nin fervore pli k pli bataladi ĝis lasta spiro, laŭ tipa orienta fatala malŝato al la vivo, aŭ ĝis fina venko, laŭ aroga eĉ iom fanfarona okcidenta maniero.

La bonaj kamaradoj el Eŭropo k Ameriko. tiom helpemaj al nia entrepreno!, certe pardonos k certe akceptos indulge la specialan mencion de nia emocio singulta, en publika danko, al tiuj karaj sambatalantoj, membroj de nobla tre antikva popolo, kies oblikvaj okuletoj devas rigardi similajn terurojn ol ni mem nun konstatas en nia okcidenta lando de hispanoj. Permesu do amikoj legantoj el najbaraj landoj, laŭtigi la voĉon, ĝis plena raŭkiĝo, trans montoj k valoj, de ekstremo al ekstremo de l' mondo en rekta direkto al oriento, por aklama krio en verva fervoro: Fratoj el Ĉinio! popol' suferanta saman krudan sorton, antaŭen! via flama tuko estas hela emblemo de firma alianco, dum muĝas la ŝtormo de alta epopeo tra ĝardenoj de oranĝarboj k ebenaj plantejoj de rizo, ankaŭ ja parencaj al via pejzaĝo tre karakteriza... Sanon, kamaradoj!

Dankon pro la flago, karaj niaj fratoj! dankon eĉ pro via velura sopiro, amata samsorta popolo de la ekstrema oriento!

KOMENTARIOJ

# AL FIA CELO PER FIA TAKTIKO

Kiam faŝistaj gravuloj, per emfazaj vortoj, supozis senduban k facilan venkon en politika baloto, senvuale klarigis la ellaboritan planon, kiun ili realigos tuj post la triumfo, tiom arde revita k tiom zorge preparita.

La programo konsistis el stranga miksaĵo de fanfarono k minaco, kiu provokis en popolaj amasoj gravan reakcion, naskinta feliĉe fortan k solidan popolan fronton, kiu gajnis la baloton kun grandega plimulto.

Sistema murdado al 15.000 hispanoj estas trafa rimedo por purigi la landon; tion ili anoncis, kio poste estos farita, por ke dekstrula registaro povu regi la landon pace k facile, kondukante la nacion al nova epoko de feliĉo k prospero.

Sed revoj k promesoj dronis en fiasko: paca subpremado ne plu povis esti celo k sekve perforta ribelo restis, kiel nura solvo, por daŭra subtenado de kreitaj interesoj k promesita efektivigo de teruraj minacoj. Ekflamis la ribelo de perfidaj militistoj k komencis la aktuala lukto kiu erare estas nomata «civila milito». Neniam ĝi estis tia, ĉar jam de la komenco nia brava popolo ne helpis nek obeis la generalajn ordonojn. Por ke milito estu civila nepre necesas ke amasa popolparto dividiĝu je du tendencoj k ĉiokaze, malgraŭ ĉiaj klopodoj, faŝistaj militistoj estis devigataj anstataŭi la hispanan popolon, kiu neniel helpis ilin, per maŭraj trupoj k fremdaj legianoj.

Do nia lukto estas, ekde la unuaj tagoj, faŝista milito kontraŭ hispana popolo, kiu denove luktas en kruela milito por konservi necesan sendependecon de la lando.

Nia kuraĝa popolo havas jam sperton pri tiaspeca lukto; unue ni defendis dum jarcentoj nian rajtan sendependecon kontraŭ absolutemaj reĝoj; due ni batalis same kontraŭ konkerema Napoleono k fine alian fojon ni defendas nun nian sendependecon kontraŭ la internacia faŝismo minacanta la mondon.

Pri kompleta k senlima sendependeco, nia popolo fieras; malgraŭ la monstra fakto ke kontraŭ tio ribeliĝis perfidaj generaloj, kontraŭ tio estas varbitaj maŭroj k legianoj k kontraŭ tio amase alvenas italoj k germanoj, ni ĉiujn venkos, kiel ni jam venkis en similaj okazoj.

Faŝistoj tute ne povis pace realigi siajn antaŭajn minacojn, ili estis kaptitaj de ega furiozo k, kun helpo de milito, malvarma venĝosento komencis regi sisteman masakron al popolo.

Aliflanke, ni ne povas subtaksi la fakton ke hispanaj generaloj blinde obeas germanan skolon pri ĉiuj aspektoj de milito; organizo, taktiko k strategio nun uzataj estas laŭ plej pura germana stilo.

Nova milita scienco aperis en la mondo dum eŭropa milito; tiam germanoj uzis specialan procedon, kiun ni memorigos.

Germana Stabo diktis jenajn leĝojn: «Germana milita aŭtoritato ne akceptas internaciajn konvenciojn por la militaj rajtoj». «Estas necese eviti la propagandon, inter la oficiroj, pri homaranaj ideoj». «Okaze de bombardado, ne estas necesa avizo.»

Generalo Hindenburg deklaris tiam laŭ oficiala gazeto: «La lando suferas; urboj malsatas. Tio estas bedaŭrinda, sed bona; oni ne povas fari militon kun sentimentalismoj. Ju pli kruela estas milito, des pli homama ĝi estas ĉar ĉio iras pli rapide al la fino. El ĉiuj militoj, la plej homama estas tiu, kiu alportas pacon pli frue».

Generalo Stenger kiu komandis la 58-an brigadon, diris:

«Ne plu devas resti kaptitoj. Oni mortigos ĉiujn kaptitojn k ĉiujn vunditojn. La kaptitojn, eĉ grandamase, oni fusilmortigos. Malantaŭ ni devas resti nenia estulo.»

Tiaj «laŭdindaj» maksimoj estis poste plibonigitaj de Italio en Abisenio k ĉiuj spertoj estas aplikataj en nia malfeliĉa lando. Franco, Mola k aliaj generaloj certe superas jam la germanajn majstrojn.

Samkiel la germanoj, ili ankaŭ komence akuzis la malamikon pri ĉiaj monstraĵoj, kiujn ili mem faris; tiamaniere la vero estas uzata laŭ kontraŭa direkto, sed ĉar temas pri veraj okazintaĵoj, kreiĝas konfuziga situacio je ilia profito.

Tamen tiu hipokrita ludo povas iam komenci fariĝi senefika.

En rilato al hispana lukto, neniu dubas jam pri la vero; estas terura la situacio kreita pro senĉesa murdado al senkulpuloj, kruela k sencela bombardado al civilaj kvartaloj k tiom multenombraj faŝistaj masakroj. La vero jam invadis la mondon kreante ondegon da indigno.

Por ke ne restu eĉ malgranda dubo en ies skeptika animo, antaŭ kelkaj tagoj, generalo Queipo prononcis per radiostacio Seviljo jenajn frazojn:

«Estas ok miloj da orfoj de fusilmortigitaj «ruĝuloj» en Seviljo k ses miloj en Cadiz. Ilia sorto pripensigas min; la nova Hispanio de la «naciismo» zorgos pri ili en aziloj, kie oni instruos al ili malami la marksismon.»

Pro la kvanto da orfoj oni povas kalkuli la nombron da ekzekutitoj, k tio rilatas nur al du provincoj.

La vero estas nombro pli granda ankoraŭ, kiun nur oni povos koni post la milito, sed tiuj vortoj estas kvazaŭ fajrero de vero, falinta el faŝista buŝo k kiun ni devas taksi laŭ ĝusta valoro. En jezuita maniero, la plej fia taktiko ne estas baro por atingo ankaŭ de tre fia celo.

**JES! ANKORAŬ** ni bezonas vian subtenon por ke nia honesta alarmo, ĉe la oreloj de la mondo, estu ĉiufoje pli forta, pli persista...

Ĉio, kion ni ricevas, estas absolute uzata por la kresko, utilo k belo de POPOLA FRONTO, nia komuna verko je la servo de la vero, en defendo de la libereco, por la ekzisto de la esperantismo.

Niaj internaciaj adresoj atendas la pafojn de via municio. Ne laciĝu do ankoraŭ! estu malavare obstinaj, kiel ni, ĝis la venko!

GENERALA INTERNACIA ADRESO
nur por mono
FARENC GUSTAVE
56, Rue du Parc
ORLEANS (Loiret) FRANCIO

NEDERLANDA ADRESO
nur por mono de holandanoj!
PETRO van der PLANK
Van Speijkstraat, 48-I
poŝtĝiro 245542
AMSTERDAM W. Nederlando

REDAKCIA ADRESO POR ĈIO ALIA
**POPOLA FRONTO — Mar, 25, Valencia (Hispanio)**

# ALVOKO

## de la Internaciaj Brigadoj al la popolamasoj de la tuta mondo

La politika komitato de la Internaciaj Brigadoj, luktantaj en la teritorio de la respublika Hispanio por la libero de l' popolo, adresas sian amikecan saluton al la popolamasoj de la tuta mondo, al la sindikataj, politikaj, kulturaj organizoj, kies tasko estas triumfigi demokration k pacon sur la Terglobo.

La Internaciaj Brigadoj sin metis je la ordonoj de la legitima registaro de Hispanio, eliĝinta el la libera balotado de la 16.ª Februaro pasintjara, por batali, apud la respublikana armeo k la popolaj milicoj kontraŭ la krimaj provoj de la ribeluloj subpremi k sufoki la popolan liberon. La Internaciaj Brigadoj, kiuj kunigas membrojn de ĉiutendencaj politikaj partioj, de ĉiuj sindikatoj k kultur-organizoj, gajnis je la kosto de l' sango de iliaj plej bonaj batalantoj la rajton proklami antaŭ la honestaj konsciencoj de la tuta mondo, ke la civilmilito en Hispanio estas trudita al la popolo, de la korporacioj k homoj, aktivaj agentoj de la internacia konspiro de l' faŝismo kontraŭ la paco.

Tiu popolo k ties registaro devas esti helpataj, per ĉiaj rimedoj, kontraŭ la dungitaj soldatoj, kiuj per murdado al virinoj k infanoj ŝtorme premas eĉ la leĝojn de l' milito. Streĉante la vicojn ĉirkaŭ la Internaciaj Brigadoj, fortigante la bojkoton kontraŭ la ribelintoj, sekurigante la patronadon al niaj batalionoj, organizante monkolektadojn por akiri nutraĵojn, vestojn, kuracilojn, ambulancojn, k.t.p. certe la organizoj, al kiuj ni nin turnas, plenumos solidaran devon.

Al laboro! urĝas la ago! Estas bezonataj pozitivaj rezultatoj en la daŭro de nur tagoj! oni scios, kiuj staras en la flanko de la libero k de la paco, laŭ la intenseco montriĝonta ĉe tiu tre internacia solidareca kampanjo, favora al la libera popolo hispana k al la Internaciaj Brigadoj.

Por la Politika Komitato: *André Marty*, *Pietro Nenni*.

# DU EPIZODOJ

## DE LA NORDA FRONTO

Tuj kiam niaj bravaj asturiaj soldatoj eniris en la provinco de Leon, ili konkeris unu valon, kie kuŝas kvar vilaĝetoj. Ĉiuj apartenis al kruela kampara politikestro krome nomata «Bastonego» kiu regis tie kvazaŭ feŭda mastro.

Kiam niaj milicanoj eniris en la valon, ili instaliĝis en la domoj, k demandis:

—Al kiu apartenas tiu domo?

—Al «Bastonego».

—Kaj tiu alia?

—Ankaŭ al «Bastonego».

Ĉiam estis sama la respondo; ĉio apartenis al sama feŭda sinjoro, kiu forkuris kiam niaj trupoj proksimiĝis minace k venĝe.

El ĉiuj buŝoj elfluis laŭta k gaja krio: «Jam ne plu ekzistas la «Bastonego!» kolektiva ĝojo invadis la enloĝantojn. Ili demandis pri ĉiuj aferoj al niaj milicanoj, ĉar ili ne sciis kion fari k naive kredis, ke milicanoj estas la novaj mastroj. Neniel estis imagebla al ili la absoluta malapero de kruelaj mastroj.

Sed la afero statis aliel; ni konkeris la bienojn de la «Bastonego» k nura solvo estis donaci ilin al kamparanoj, kiuj ĉiam laboris sur kampoj apartenantaj al aliulo. Oni kunvokis ĉiujn en placo k en balkono de la vilaĝeta urbodomo, solene k simple estis farita la demokrata revolucio.

La vilaĝanoj sin rigardis reciproke kun mirego en okuloj. La tuta valo apartenas al ili, k ili malfermis la pordojn de ĉiuj domoj k volis ĉion donaci al milicanoj, kiuj nenion ja akceptis.

Febro de gajo briligis ĉies okulojn, dum la ombro de la plej kruela ekspluatinto por ĉiam malaperis el tiu terpeco liberigita el servuteco.

---

Al niaj linioj de Asturia fronto venis tri artileriaj soldatoj, kiuj funkciigis kanonon, kies fermilon ili kunportis. Anstataŭ tiu fermilo, ili lasis sur la kanono jenan leteron:

«Al niaj malamikoj! Ni kredas, ke vi furiozos kiam vi konstatos, ke vi perdis kanonon k ties servantojn.

Vi diras: «ĉio por la patrio» k ni, por la patrio riskas nian vivon, kiun ni plezure oferas vere nun al ĝi.

Ni iras apud la «malbonuloj» por esplori ĉu ili estas pli bonaj ol la «bonuloj». Ondo de sanga kruelo k maljusto baras al vi konstati, ke soldatoj malamegas vin k, iom post iom, ili vin forlasas.

Baldaŭ vin trafos definitiva puno. Kiu scias ĉu estos ni la punantoj! Se okazus tio, vi ricevus kune kun nia malamo nian pardonon.

Via moto estas: «Dio, patrio k civilizo» sed vi mensogas. Via dio ordonas pardonon k vi ĉiujn turmentas. «Unu granda Hispanio» vi diras, k vi nur deziras la daŭron de privilegiuloj; ni, male, deziras unu Hispanion por ĉiuj hispanoj. Feŭda tempo jam pasis k nun ne povas ekzisti subpremantoj nek subpremaltoj.

Via krio: «Vivu Hispanio!» estas hipokrita. Ni foriras ĉar ni celas defendi nian idealon, nian Hispanion k la civilizon, kiun vi makulas.

Vivu ĉies Hispanio! Vivu la respubliko! Sanon, kamaradoj, kiuj restas ankoraŭ sub jugo de ekzekutistoj!

### FREMDA EN SIA PATROLANDO



—Diru, Hans, kial tiu stultulo rigardas nin tiel mirigite?

—Li estas nur fremda soldato, Fritz... li estas hispano.

# ANONIMA OFEREMO

Antaŭ kelkaj semajnoj, la rapida antaŭeniro, marŝo tiam nedetenebla, de faŝistaj trupoj en vojo al Madrido, kreis gravan danĝeron al hospitalo de Carabanchel, tre proksima al la nacia ĉefurbo.

La bezono forigi el ĝi la vunditojn, fariĝis nepre necesa, sed tiu servo estis ĉiumomente pli k pli malfacila; faŝistaj obusoj jam ekfalis sur tiu konstruaĵo k multaj vunditoj, kiujn oni penis savi, restis viktimoj de krima mitralo.

Tiam okazis epizodo vere rakontinda, kies protagonistoj estis la bravaj soldatoj de Atakgvardio. Oni diris:

—Estas bezonataj volontuloj, kiuj allogu la malamikajn pafilojn al alia celo—. Tio valoris same ol diri: «Estas bezonataj herooj pretaj senŝancele al fatala morto».

El la vicoj de Atakgvardio tuj eliris grupo, la legio «Ŝturmo», pri kiu tiom malmulte oni parolis malgraŭ tio ke ĝi multfoje meritis varmegajn esprimojn de dankemo.

Rapide tiu legio okupis monteton el kie ili atakis k altiris la atenton de la malamiko, kiu estis devigata direkti tien siajn kanonajn pafojn, forlasante la hospitalon, dum iom da tempo.

Niaj heroaj soldatoj, sen necesaj kondiĉoj por ajna defendo, luktis k rezistis kuraĝe mitralan pluvegon. Tridek kamaradoj jam falis kiam la komandanto ordonis rapidan forlason de la monteto, sed la milita hospitalo jam estis tute malplena.

Faŝista taktiko pri murdo al vunditoj plene fiaskis ĉi-okaze dank' al heroa ofero de tiu grupo da kuraĝaj soldatoj, en legio «Ŝturmo» de nia Atakgvardio.

**Via solidaro estu respondo al la internacia interveno de la tiranio**

# POLITIKA TABULO

Por faciligi al niaj legantoj klaran komprenon pri aferoj, kiuj sendube ludas rolon en la hispana milito, ni prezentas al ili simplan skizon pri la politika panoramo de la eŭropaj ŝtatoj ĉe eksplodo de la ribelo en nia lando.

Eŭropo nuntempe estas regata per Respublikoj k Monarkioj demokrataj, havantaj, kiel sistemon, la liberalismon; per ŝtatoj aŭtokrataj, kiuj dividiĝas ankaŭ en Monarkioj k Respublikoj, k per socialista Ŝtataro: la U. S. S. R. Inter ĉiuj konsistigas la eŭropan ŝaktabulon, sur kiu estas ludota la granda partio, kies antaŭanoncoj estas la nunaj okazaĵoj en Hispanio.

Ekzistas en Eŭropo jenaj demokrataj Respublikoj: Svisio, Francio, k Ĉeĥoslovakio.

Al ĉi tiu grupiĝo oni povas aldoni Irlandon, kiu, kvankam dependa de la Brita Imperio, fakte estas vera Respubliko regata per sia Ĉambro de deputitoj k demokrate reprezentata per ŝtata Prezidanto.

Monarkioj konstituciaj: Britio, Belgio, Nederlando, Svedio, Norvegio, Danio, Jugoslavio k Rumanio.

Monarkioj duone diktatorecaj: Bulgario k Grekio.

Respublikoj duone diktatorecaj: Polio, Latvio, Litovio, Estonio k Finnlando.

Monarkio aŭtokrata: Italio.

Respublikoj aŭtokrataj k antiliberalaj: Germanio, Aŭstrio, Hungario k Portugalio.

Respublikoj kun speciala diktatoreco je nuanco maldekstruma k revolucieca: Turkio k la Unio de Sovetaj Socialistaj Respublikoj: Sovetio.

En la diplomata ordo ĉi tiuj nacioj grupiĝas laŭ jena maniero:

Britio ekzercas sian influon sur la registarojn de Svedio, Norvegio, Danio k ceteraj Baltaj popoloj k ankaŭ en Nederlando, Belgio, Turkio, Grekio k Portugalio ĝis nunaj momentoj kiam nia najbara lando ŝajne estas gajnita de Italio.

Francio estas kunigita per traktatoj k militaj interkonsentoj kun Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio, Rumanio, k Portugalio ĉi lasta dubige post la ĵusaj k ankoraŭ ne bone konataj kompromisoj kun Hitler.

Svisio konservas sian tradician sendependecon. Ĝi havas la subtilan arton daŭrigi plejkorajn rilatojn kun siaj najbaroj, en diplomata centro.

Germanio, izolita depost la Versajla Traktato, atingis la kreadon de faŝista bloko—renovigo de la Sankta Alianco de komencoj de la XIXa jarcento—, al kiuj aliĝas Italio, Portugalio, Hungario, Aŭstrio, k ankaŭ eble Polio, malgraŭ la milita interkonsento de ĉi lasta kun Francio.

Sovetio estas kunligita milite al Francio k al Ĉeĥoslovakio. La enigmo konsistas en la scio ĉu, en okazo de armita konflikto, ili forirus kun la aliaj danubaj ŝtatoj kiuj konsistigas la Malgrandan Ententon, sub kontrolo de Francio.

La sinteno de Britio povas esti decida, ne nur pro ĝia propra potenco, k tiu de ĝiaj transmaraj kolonioj, sed pro la malgrandaj k riĉaj nacioj sur kiujn ĝi ekzercas sian influon.

Aparte restas Bulgario, kiu pro inklino de la reĝo k de ĝia Registaro, kun personeca nuanco, povas tendenci sekvi la faŝistemajn popolojn, kvankam pro sia situo en la Balkanoj estas tre ligita al la politiko de la Malgranda Entento.

Alia peono sen ligo estas Turkio, fere regita de Mustafá Kemal. Ni jam diris, ke la kerno de ĝia Registaro estas el revolucia nuanco. Ĝi estas en bonaj rilatoj kun la Sovetoj, kun kies reĝimo ĝi havas kelkajn similojn. Aliflanke, la angla influo sentiĝas tre multe en ĉi tiu lando. Ĝia sinteno estas tre grava ĉar ĝi konsistigas la ŝlosilon de la Dardaneloj k de Nigra Maro kun riĉaj petrolaj kaŝejoj.

Tia estas la oficiala pozicio, laŭ rapida vido, de la ĉefaj peonoj, en la eŭropa tabulo, dum sangas Hispanio.

# SAGETOJ SEN MALICO

● Jen alia hispana proverbo: «Tra ĉiuj vojoj oni povas veturi al Romo».

Konkludo: tra Maroko, oni ankaŭ povas trafi Parizon.

● S-ro. Eden emfaze deklaris en la Brita Parlamento: «La temo pri la politika sistemo en Hispanio estas privata afero de la hispana popolo. Tial ni kontinuos laborante kontraŭ ĉia fremda interveno en tiu lando».

Kompatu nin, kamaradoj! Kia nova minaco estiĝos por nia popolo, se s-ro. Eden daŭrigas sian «ĝisnunan laboron»?

● Mussolini k Hitler, siaflanke pretendas eviti starigon en Hispanio de reĝimo, kiun ili ne ŝatus, kvankam por trudi sian reĝimon ili ne konsultis siajn respektivajn popolojn. Ambaŭ diktatoroj ŝajne enuas pro neagado, tial ili praktikas la «ne-intervenon» ĉe ni, por sin distri.

Por kuraci ilian splenon, ni proponas al ili problemon:

Kiamaniere mildigi la ekzistantajn diverĝojn, kiuj ekzistas inter ili pri la anekso de Aŭstrio? Por ke ili ne tro cerbumu, ni ankaŭ donas la solvon: Dividu Aŭstrion en du partojn, unu por ĉiu. Se la aŭstroj plendas, tio signifos ke ili estas «ruĝuloj», ĉu ne? Tiuokaze, ili meritos esti punataj per kreado de nova komitato pri ne-interveno!

Ni, hispanoj, tute ne kontraŭstaros, se ili aneksas ankaŭ Portugalion.

● Prezidanto Azaña alte paroladis, li diris jenon: «Se ni batalus jam por komunismo, estus la komunistoj, kiuj sole batalus; se por socialismo, nur la socialistoj; se por la anarkio, nur la anarkistoj; se por maldekstra Respubliko, batalus sole la respublikanoj. Sed la vero estas, ke ni ĉiuj, laboristoj, intelektuloj, burĝoj, sindikatoj k partioj kunbatalas por la libero de la hispanoj k por la sendependeco de nia popolo».

Ne gravas. La tutmonda reakcio proklamos, ke Azaña estas «ruĝa bolŝeviko».

● Ŝajnas, ke la germana faŝismo elektis Ĉeĥoslovakion, kiel kampon por nova eksperimento, simila al tiu en Hispanio. En Belgio, la *Rex*-movado, laŭ informoj, bone progresas. La konsciaj «naciistaj patriotoj» belgaj k ĉeĥoslovakaj sin pretas helpi la invadon de siaj landoj per la germanaj trupoj, dum la demokratoj dormetas en lulilo, ignorante la danĝeron, ĉar ankaŭ ili ne legis «Mein Kampf».

Evidente, la vorto «naciismo» perdis sian valoron. Ĝi nuntempe signifas «*Nazi*-ismo»-n. Se tiu doktrino sukcesus en Eŭropo, ne plu estus milito, sed daŭra paco inter la nacioj kunfandiĝintaj sub la signo de la Svastiko. Tiel dissaltus la «obstinaj baroj».

Tio estas preskaŭ la programo de nia verda himno!

# AL LANDAJ ASOCIOJ

Eĉ, en plena fajro de nia milito, ekzistas ŝancoj, por la disvastigo de Esperanto inter la diversnacia amaso, kiu venis al Hispanio por albatali la faŝismon. Por tiu konkreta k speciala flanko internacia ni bezonas la specifan helpon de ĉiuj Esperanto-Asocioj.

Ni akceptos kun plezuro kvanton da materialo: vortaretoj, ŝlosiloj, gramatikoj k ĉiaj reklamiloj en eŭropaj lingvoj por larĝa disdonado al membroj de internaciaj brigadoj.

Tio estos ĝentila k utila rememoro pri nia verda movado, dum enuo, por tiuj, kiuj kuŝas en hospitalo pro vundo, k eĉ bona instigo, dum ripozo en tranĉeo, por tiuj, kiuj en la fronto. rompas la kornojn de la drako, kiu volas rabi nian vivon de popolanoj k nian stelon de esperantistoj.

Nia redakcia adreso atendas jam dume!

# MOZAIKO

• Necesas reliefigi la heroan partoprenon de nia brava junularo en la milito; grandega plimulto da niaj kunbatalantoj apartenas al la juna generacio, kiu entuziasmoplene albatalas la faŝismon.

En nia armeo batalas Luis k José Alcalá Castillo, du filoj de la eksprezidanto de hispana respubliko Alcalá Zamora, kiu forkuris el nia lando nur tagojn antaŭ la eksplodo de l' ribelo.

Ankaŭ luktas en niaj vicoj, José k Ramón de Unamuno, du filoj de la tutmonde konata Miguel de Unamuno, fama saĝulo, ĵusmortinta, kiu lastatempe faŝistiĝis malgraŭ sia antaŭa politika luktado kontraŭ dekstruloj.

Tiuj faktoj forte plifirmigas nian esperon.

• Oficialaj sciigoj el angla deveno plene konfirmis la alvenon de 10.000 italoj, tute «volonte», en havenon Cádiz. La 22-an Decembro alvenis 6.000 k la 1-an Januaro 4.000, ĉiuj komplete ekipitaj.

Tia fakto vere ne estas novaĵo por ni, ĉar alveno de italoj k germanoj ne ĉesis ekde la unuaj tagoj; sed, ni ĝojas konstatinte, ke angloj finfine jam sukcesas vidi pruvojn de konstanta perfido.

• Dum en faŝista zono ĉiuj lernejoj, liceoj k universitatoj estas fermataj, en respublika teritorio ĉiuj instruaj organizoj funkcias intense.

La ministerio pri Publika Instruado ĵus kreis specialan gimnazion por abiturienta senpaga instruado al laboristoj; la koncerna kunvoko atingis entuziasman akcepton kiu devigas la registaron starigi novajn planojn.

• Ĉe la Aragona fronto k en faŝista kampo batalas la rusa kapitano Paul Rachewsky, kiu apartenis al cara skorto. Li diris, ke tiamaniere li defendas siajn idealojn.

• Aperis nova fronto en provinco León; la asturiaj milicoj, kiuj heroe dejoris sur la neĝoplenaj pintoj de asturiaj montoj, malsupreniris el ili k enpenetris la valojn de tiu provinco.

Gravega estas tiu faro ĉar ĝi permesas utilan atakon al faŝista provinco, kiu ŝajnis netuŝebla pro tio ke estas preskaŭ neeble trapasi la ĉirkaŭantan montaron.

Sed ne ekzistas baroj por la bravegaj asturianoj. Jam ili kreis novan zonon kie oni defendas efike la respublikon.

• La 8. Januaro dum la nokto faŝistaj aeroplanoj superflugis en Madrido la neŭtralan kvartalon, kiu entenas diplomatajn ejojn k post zorga serĉado, kiu daŭris duonhoron, ili bombardis la anglan ambasadorejon. Je tiu krima k intence preparita atako rezultis vunditaj du personoj: La oficiala angla reprezentanto Mr. Edwin G. Lange k Ms. Angela Morris. Mr. Lange deklaris laŭlitere, ke «tiuj noktaj bombardadoj, sen ia ajn milita celo, estas la plej monstra krimo.»

Malgraŭ tiaj fiagoj, Mr. Eden senĉese babiladas pri la luno.

• Lia episkopa moŝto en insulo Maljorko, post milita diservo, prononcis ĉi subajn vortojn:

«Se oni vere volas honori dion k defendi la sanktan katolikan religion, estas necese, ke forlasante sentimentalismojn, ni ekstermu lastan marksiston, ĉar ili ne estas kristanoj nek hispanoj.»

Jen ĝusta interpreto pri kristana maksimo: «Amu unu la alian».

• La itala gazeto «Roma Fascista» publikigas jenajn signifoplenajn frazojn: «La komedio pri la ne-interveno finiĝis; niaflanke, neniam ni ĝin iniciatis. Faŝismo denove luktas k venkos; ni batalas en Hispanio ĉar tie estas nun la plej vigla sektoro de nia milito; hodiaŭ estas Franco la estro de nia revolucio k ideale, spirite k materie ni staras, kun armiloj en mano, apud li k apud liaj legianoj. Ne estas taŭga momento krei iluziojn; nenia paca kombino estas ebla nun.»

• Brita registaro ricevis informon de anglaj kompanioj *Riotinto Company k Sulphur and Copper Company*, laŭ kiu faŝistaj aŭtoritatoj alprenas la produktitan kupron, kiun ili sendas al Germanio.

Tiuj kupraj minoj estas en provinco Huelva kie franca kompanio ankaŭ posedas minon, kiu laboras sub la samaj kondiĉoj pri livero k prezo fiksitaj de faŝistaj aŭtoritatoj.

• Laŭ francaj sciigoj, en haveno Napoli okazis gravaj incidentoj ĉar la ŝipanaro de itala komerca ŝipo «Lombardia» rifuzis transporti soldatojn al Hispanio. Oni elŝipigis tiujn maristojn, kiuj estis arestataj.

En Germanio aperas ofte en vagonaroj, stacidomoj k aliaj ejoj afiŝoj per kiuj oni atakas Hitleran diktaturon k oni defendas hispanan popolon.

Ambaŭ faktoj estas kuraĝigaj k signifoplenaj. Tia sabotado devas kreski, kreskadi, ĝis atingo de plej trafaj rezultoj.

• Oficiala statistiko de nia ministerio de Maro k Aero, konigas rezulton de la laboro plenumita de nia aera armeo dum decembra monato.

Niaj aeroplanoj faligis dum tiu monato 25 faŝistajn aeroplanojn, ni perdis 5 aviadilojn.

Niaj aeroplanoj bombardis ok aviadkampojn kie ili detruis kelkajn aviadilojn, kies nombron oni ne povis difini ĝuste.

• Nova k neatendita speco de soldatoj aperis en madrida fronto. Faŝistaj militistoj fervore faras sian eblon por montri al la tuta mondo konvinkigajn pruvojn pri sia plej valora eco, pri sia alnomo «naciistoj», k ili fabrikas senĉese pli k pli valorajn pruvojn, tiucele.

Unue aperis «naciistaj» legianoj, poste «naciistaj» maŭroj, italoj, germanoj... k nun aperas novaj «naciistaj» trupoj, NEGROJ varbitaj en insulo Fernando Poo, kiuj estas transportitaj al nia lando por defendi la NACIISTAN FAŜISTAN CIVILIZON

**AVIZO AL RADIO-AŬSKULTANTOJ**

Ĉar okazas nuntempe reformoj k novaj planoj, por la partiaj stacioj, provizore ne plu funkcias nun la programoj en Esperanto, kiuj eble baldaŭ fluos kun freŝa enhavo



Invito al medito, por la internacia opinio, estas la ĉagrena mieno de ĉi tiu knabo, kiu, antaŭ la fordetruo de sia modesta hejmo, spertas la efikon de la nova faŝista «civilizo»

**Esperanto, kiel demokratio de la kulturo, luktas kun la hispana popolo**

## KORTUŜA LETERO

Al esperantista gazeto POPOLA FRONTO en Valencio.

Karaj gekamaradoj! Antaŭ kelkaj semajnoj, oni skribis al vi leteron el la ĉeĥoslovaka urbo Zlin. La letero estis skribita pro iniciato de ŝulaboristoj k mi estis la aŭtoro. Inter alio mi esprimis en ĝi, ke multaj laboristoj, kelkaj el ni jam veturis helpi persone al heroa batalo de hispana popolo kontraŭ la faŝismo. Nu, karaj kamaradoj, hodiaŭ matene ni mem troviĝas je stacidomo de via belega urbo Valencio!

Kiel membroj de la Internacia Brigado, ni veturas al Albacete k poste (ni deziras jam hodiaŭ iri) al la madrida batalfronto.

Se eble sendu al ni en Albacete vian bonegan gazeton.

Sciigante vin pri nia alveno, ni, travivantaj plej feliĉajn horojn de nia vivo, salutas vin ĉiujn kaj tutan laboristan loĝantaron de Hispanio kun flama k ŝtala konvinko, ke la venko estas nia!

Ni batalante je brako de la heroa hispana popolo, baldaŭ liberigos ĝin k helpos purigi ĉi belan landon el faŝistaj bestaj hundoj. «Salud!»

20 Januaro 1937. Via. JAR. HOŜCH k aliaj subskriboj

## NIA MUNICIO

| | | |
|---|---|---|
| Valencia esperantistaro . . . | 66 | ptoj. |
| V. H.—Sabadell . . . . . | 6 | » |
| F. G.—Sueca . . . . . . | 3 | » |
| F. T.—York . . . . . . . | 3 | ŝil. |
| B. R.—Plzen. . . . . . . | 96 | ffr. |
| H. V.—Rotterdam . . . . . | 28 | » |
| G. N.—Stockholm. . . . . . | 5 | svdkr. |
| F. J.—Aneby. . . . . . . | 5 | » |
| K. N.—Enköping . . . . . | 5 | » |
| A. A.—Savigny. . . . . . | 5 | ffr. |
| J. J.—Chalons . . . . . . | 10 | » |
| V. B.—Talun . . . . . . | 26 | » |
| J. E.— » . . . . . . | 26 | » |
| N. L.— » . . . . . . | 26 | » |
| K. M.—Paris . . . . . . | 10 | » |
| M. H.—Rueil . . . . . . | 10 | » |
| B.—Paris. . . . . . . . | 5 | » |
| T.— » . . . . . . . . | 10 | » |
| G.— » . . . . . . . . | 50 | » |
| P. C.—Vaulx . . . . . . | 10 | » |
| F. G.—Orleans. . . . . . | 10 | » |
| J. W.—Johnstone . . . . . | 8 | ŝil. |
| Aalsmeera Lab. Grupo . . . | 55 | ffr. |
| F. L. E. Leeuwarden . . . . | 227 | » |
| K. V.—Praha . . . . . . | 37 | » |
| B. C. k J. B.—Rotterdam . . | 1 | dol. |
| J. D.—Philadelphia . . . . | 2 | » |
| R. E. W. Farrell. . . . . . | 1 | » |
| A. E. P. Esp. Fako.-Barcelona | 7 | ptoj. |
| G. M.—Hillegersberg . . . | 10 | ffr. |
| J. C.—Plouguerneau. . . . | 20 | » |
| G. E. O. Saint Etieene . . | 30 | » |
| L. L.—Toulouse . . . . . | 15 | » |
| B. B.—Huddersfield. . . . . | 26 | » |
| M. G.—Besancon. . . . . . | 50 | » |
| E. A.—Folkestone . . . . . | 4 | ŝil. |
| A. F.— » . . . . . | 4 | » |
| J. S. C.— » . . . . . | 5 | » |
| H. P.—Parnu . . . . . . . | 28 | » |
| F. L. E.—Amterdam I . . . . | 1'30 | guld. |
| F. L. E.—Amterdam V . . . . | 6 | » |
| F. L. E.—Amterdam XII. . . | 1'25 | » |
| F. L. E.—Amterdam XIII . . | 7'50 | » |
| W. F. K.—Amterdam. . . . . | 1 | » |
| J. A.—Lyon . . . . . . . . | 5 | ffr. |
| B. H.—Leeuwarden . . . . . | 17 | » |
| Lond. Taks. Grupo . . . . . | 44 | » |
| J. A. pere de J. L. . . . . . | 50 | » |
| G. J—Cholet . . . . . . . | 10 | » |
| J. P.—Rhône. . . . . . . . | 15 | » |
| L. K.—Nynasham . . . . . . | 26 | » |
| G. L. E.—Wandre Liege . . | 14'38 | » |
| M. M.—Epeneux . . . . . . | 10 | » |
| M. S.—Torquay . . . . . . | 2 | ŝil. |
| F. L. E. Amsterdam . . . . | 155 | ffr. |
| V. d. E.—Helder . . . . . . | 15 | » |
| J. M.—Yssy . . . . . . . . | 164'50 | » |
| R. D.—Asniens. . . . . . . | 10 | » |
| N.—Paris . . . . . . . . | 10 | » |
| A. R.—Paris. . . . . . . . | 10 | » |
| F. E. T. Paris. . . . . . . | 12 | » |
| C. F.—La Louviere . . . . . | 5 | » |
| L. E. G.—Zagreb . . . . . . | 18 | » |
| E. B.—Montreux . . . . . . | 9 | » |
| J. B.—Cartagena . . . . . . | 10 | ptoj. |
| F. V. Terrassa . . . . . . | 7 | » |

**ESTUS KONVENE** por tiuj amikoj, kiuj ricevas la gazeton nur pere de siaj landaj asocioj, starigi poŝtan rilaton kun ni, por rekta akcepto de nia bulteno, laŭ koncerna adreso, post matrikula surskribo en la administracia sliparo. En tiu okazo ili devas nepre atentigi pri tio sian organizon por tuja nuligo de la alsendo profite de alia kamarado.

## Lasthora Impreso

S-ro. Azaña, ŝtata prezidanto, faris sobran k sensacian paroladon por studi radikojn k sekvojn de nia milito dum ses monatoj, Por objektivaj internaciaj oreloj ĝi estis frafa k serioza respondo (*).

Germanaj k italaj soldatoj premas pli k pli, ne nur jam al Madrido, sed en la riĉa provinco de Malago; kun abundo de sklaveca karno ili celas rompi niaj tieajn frontojn, kie vigle deĵoras nia armeo kun unu sola deziro: furiozigi la faŝistojn pro fiasko de iliaj planoj.

En la nordo niaj pozicioj pliboniĝas de tago al tago. La internacia opinio jam konas la cinikan respondon de niaj malamikaj landoj pri tiu afero de la volontuloj. La invado k okupo, fare de Germanio k Italio, de la parto kie la faŝismo regas, okazas dum nunaj tagoj tute senvuale; malgraŭ la serioza averto de nia ministro por la ekstero, la registaroj de la demokrataj landoj ankoraŭ hezitas...

(*) Ni intencas eldoni broŝure ĉi tiun gravan k eĉ belan paroladon en esperantista vesto. Certe en venonta numero, ni povos jam informi definitive prio tio, post studo je la eblo de nia buĝeto.

Presejo de J. Olmos, Alicante, 33, Valencia

## POPOLFRONTA LETERUJO

O. K.—Barcelona.—Ni ĝojas pro ekfunciado de via entrepreno k deziras al vi plenan sukceson.

D. F. Ealing, London.—Ni notas vian deziron k espereble vi estos kontentigita. La uzado de «k» anstataŭ «kaj» celas gravan ŝparon de spaco en malampleksa gazeto, kia est?s la nia.

M. K. K.—Rostov sur Don.—Dankeme ni ricevis leteron k ankaŭ librosendaĵon. Vi estos laŭeble komplezita en via peto.

A. H. T.—Turku.—Dankon pro vía verktraduko, kiun ni laŭtlegis en rondeto k estis bone ŝatata.

S. E. S.—Warszawa.—Alvenis 9 respondk. Ni alsendos la menditajn ekzemplerojn.

N. B.—Kiev.—Kun danko pro viaj klopodoj ni informas vin, ke ni jam ricevis el k-do. Miĥalski tradukon de la sama verko.

B. E. G.—K. A. K.—Bedford.—Ni transsendas la rezolucion de viaj lignolaboristoj al la koncernuloi k eventuale ni estos perantoj por la respondo.

Esperantisto spite ĉiujn.—Lille.—En ĉiu numero aperas la adreso, kiu interesas vin. Notite la cetera enhavo de via tre estimata letero.

B. P.—Moskvo.—Simila propagando jam estas daŭre farata per ciuj eblaj rimedoj en la koncernaj medioj kun relativa sukceso, kiu espereble pliiĝos tiom, kiom pli da tempo forpasos k ĉiu konscios pri la vero k pravo laŭ sia medito k sperto.

E. L. O.—London.—Por forigi ĉian dubon, ni atestas esti ricevintaj jam viajn 5 ŝiligojn.

Tabernes de Valldigna.—Tieaj samideanoj bonvolu informi nin pri k-do. J. Bordes por sciigi pri li eksterlandan amikon lian

Noginski, apud Moskvo.—Danke ni konfirmas ricevon de letero de studentoj pri medicino, kies peton ni provos plenumi.

J. S.—Poruba.—Via monsendo (20 ĉ. kr.) estas en bona ordo.

Londona Taks. Grupo.—London.—Ni kvitancas pro viaj 7 ŝilingoj, kiuj bone alvenis

R. B.—Plzen-Letná.—Ni notas vian deziron k ĝustatempe ni skribos al vi pri la afero.

Batalfronto de Huesca.—Ni petas informojn pri k-do. Jozefo Bernabeu, 3-a. Centuria, 1-a. Grupo, kolono «Los Aguiluchos».

F. J.—Aneby.—Ni informas vin, ke viaj 5 sved. kronoj trafis nin.

G. C. Flysta-Spanga.—Nenion ni mem ricevis pere de F. I. S. Parizo. Eble tiu organizo difinis al via mono alian celon. Se vi enketos pri tio, diru ion al ni.

Ĉ. L. A. E.—Aussig.—Efective ni ricevis el vi 10 respondkuponojn k ni dankas la Grupon Warnsdorf. Pardonu, ke ni ne menciis tion ĝustatempe.

PEK-filio.—Rostov Don.—Via letero 11. Januaro alvenis bonorde k ankaŭ ĉio alia de vi aludita. Ni atentos laŭeble viajn indikojn. K-do. Mangada havas militan postenon en Albacete.

Katalunaj Esperantistoj. Bonvolu sciigi nin se eb'e pri k-doj. Galdino Roura (Cassà de la Selva) k Fernando Martinez Ungria (str. Pastro Claret, 130, Barcelona) por informi ĉeĥoslovakan korespondanton.